



## Eroj pioniraj okaze de la 40-a jubileo de Kuba Esperanto-Asocio.(2)



[Kuba Esperanto-Asocio](#) festas ĉi-jare sian 40-an jubileon. Tiucele la kubaj esperantistoj sin preparas por tutlande festi la datrevenon de la kuba esperanto-asocio kaj organizas diversajn agadojn.

Lige al tiu ĉi jubilea agado, ni memorigas valorajn historiaĵojn kiuj kulminis per renaskiĝo de la nuna KEA.

En la libro *Historio de Esperanto en Kubo* (1904-1973) verkita hispanlingve de Juan Ramón Rodríguez, aperas ege interesaj sciindaĵoj. Ekzemple, mi trovis raporton pri agadoj de la Kuba Societo por la Propagando de Esperanto en la dua semestro de 1911 kes rezultoj tre bonis: oni kreis kvin klubojn, tri el ili en la urbo okcidenta Matanzas, najbare de Havano.

La ĉefurbo de l' Yumurí-rivero, kiel ankaŭ ĝi estas nomata, komence de oktobro, agnoskas la naskiĝon de esperantista klubo formita de viroj nur-la unua laŭ la informoj-, kiel rezulto de la laŭdinda laboro de Mateo I. Fiol, Luis E. Fernández, José F. Fernández kaj Ramón Suárez, kiuj, inter aliaj, formis la Estraron.

Sed, fine de tiu ĉi monato oni kreis la unuan virinan klubon de Matanzas, kies prezidantino estis María Luisa Badía. La dua virina klubo en tiu urbo estis kreita komence de novembro, gvidita de Gloria Añorga.

Ankaŭ en tiu dua semestro de 1911 estiĝis la ideo, en la Liceo de Limonar, krei sekcion de



---

Esperanto, kaj rezulte, oni starigis la klubon de La Printempo, gvidita de Eduardo Masdéo.

Sendube temis pri tre aktiva jaro kiu kunportis pliajn bonajn novaĵojn por la tiama societo, kiu ĝis tiam ne havis oficialan sidejon. Pri la sekvoj, ni plu rakontos en venonta prezento pri la pioniraj agadoj de la kubaj esperantistoj, okaze de la baldaŭa 40-jariĝo de Kuba Esperanto-Asocio, la 16-an de junio 2019.